


# katolika sento

'74

anno 53°
u.e.c.i.

# KATOLIKA SENTO

**BOLLETTINO DELLA**
**UNIONE ESPERANTISTI CATTOLICI D'ITALIA (U.E.C.I.)**

**Anno 53° - 1974**

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (MI)

Redattore per la
Voce Esperantista di Roma:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA
Poŝtĝirkonto 1-37638

Redattore
del Bollettino U.E.C.I.:
SIG. GLAUCO CORRADO
Via Palmanova 28
20132 MILANO

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO
Poŝtĝirkonto 3-7791

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964

KATOLIKA SENTO
n° 3
53a Jaro Marto 1954

KUN LA VIOLKOLORAJ LITURGIAJ vestoj, simbolo de pento, Paŭlo 6a revenis al Sankta Sabina sur monteto Aventino, por la unua karesma "stacio". Ĉi tiu estis la dek unua fojo, ke la Papo piediris laŭ la ne longa vojo inter la benediktana baziliko de Sankta Anselmo kaj la dominikana de Sankta Sabina por pentofara procesio, daŭrigante la tre antikvan riton de la "stacioj" kaj por celebri, fine, la meson de la "cindroj", en kiu oni preĝas, "por ke la kristana popolo komencu, per la karesma fasto kaj pentofaro, itineron de vera konvertiĝo".

En la belega prakristana baziliko kuniĝis, krom la religiuloj de la kvin Aventinaj monakejoj: dominikanoj, benediktanoj, trapistoj, aŭgustenanoj kaj somaskoj, centoj kaj centoj da klerikoj de la tuta mondo, fratinoj, religiuloj kaj laikoj, junuloj kaj maljunuloj. Kaj en la sanktullitanioj, kantataj dum la procesio, per kiu la solena celebro komenciĝas, estis reprezentitaj en la alvokataj nomoj, ĉiuj tempoj, ĉiuj mondopartoj, ĉiuj sanktecaj vojoj: "Sankta Tomaso More, Sankta Sabina, Sankta Maria Goretti ... La papo mem celebris la meson. Kaj post kiam diakono legis la evangelion, Paŭlo 6a el la ambono (vidu la foton) komentis per la homilio (pri kio ni donas vastan resumon) la konceptojn ĵus esprimitajn el la evangelio, pri nia kristana sinteno dum la karesmo.

Fine de la homilio estis benataj la cindroj. La Papo ricevis ĝin de kard. Garrone, kiu havas "titolon" de Sankta Sabina, kaj poste li mem surkapigis ĝin al la kardinaloj, Episkopoj, religiaj superuloj kaj religiuloj, dum aliaj sacerdotoj disdonis ĝin al ĉiuj fideluloj.

## LA SEVERA STILO DE LA KRISTANA VIVO (1)

Cindromerkredo, granda momento de la kalendaro de l' preĝado: komenco de la Karesmo. Ankoraŭ foje la Papo, dum la pentofara ceremonio en la Baziliko de Sankta Sabina, alvokis la atenton de la fideluloj al la esencaj temoj de la karesma periodo, kiu nin invitas al pli intima persona renkontiĝo kun la Sinjoro por purigo de nia kristana vivo. "Pentofaru kaj tiam la Dia Regno alproksimiĝos al vi": ĉi tiu voĉo - diris Paŭlo 6a - resonas ankoraŭ hodiaŭ vespere en ĉi tiu templo, kiu per si mem parolus kaj parolas, kie ĉio ŝajnas inspiri al ni akcepti ĉi tiujn vortojn, ĉi tiujn pensojn". "Ĝi estas anonco, koncernanta ne nur la profetaĵon pri la veno de la Dia Regno, sed eĉ, kaj de pli proksime, la misteron, kiun estas travivantaj kaj plenumantaj ni, Eklezio de Dio, ni, disĉiploj de Kristo, precipe ni, kiuj al Kristo Sinjoro konsekris nian ekziston, kiuj aŭskultis Lian voĉon, kaj al Li ĵuris nian tutan fidelecon". La celebrado estas ne nur memoriga, sed ĝi estas ankaŭ renoviga de la eterna mistero, kiun la kristana historio plilongigas kaj malavare disdonas al tiuj, kiuj kapablas ĝin akcepti: la paska mistero.

---

(1) Laŭ ekstrakto el "L'Osservatore Romano" de la 1-a de marto.



Tiu mistero, en kiu koncentriĝas la vero, la planoj de Dio, la teologio pri nia savo, la destinoj de la animoj, niaj spiritaj sortoj mem, la arto, per kiu la Eklezio formas kaj gvidas la animojn, metas en niajn spiritojn iun agitiĝon. "Ni ne povas resti trankvilaj - diris la Sankta Patro - kaj permesi, ke ĉi tiu benita tago forpasu sen ke nia animo eniru en iun tumulton de pensoj, de deziroj, de firmaj intencoj, de problemoj, kaj sen ke ĝi vidu siluetiĝi antaŭ si multajn instruojn, indikojn, konsilojn, per kiuj la Eklezio volas disciplini ĉi tiun periodon".

Estas tempo de fasto. "Ni observu ankoraŭ - diris la Papo - la antikvan fastodisciplinon, kiu hodiaŭ estas tre mildigita, sed perdis nenion el sia esenco, nome el sia kapablo superregi ĉi tiun nian homan naturon tiom kompleksan, tiom ribeleman, tio estas superregi en ni la homon, kiun la Sankta Skribo nomas "animalo", por ke venku la homo "spirita". Ni volas kapabli mastri nin mem, bremsante la postulojn de nia surtera vivo, kiuj iufoje iĝas perfortaj, invadaj, superaj. Ni devas agi tiel ke la homo de la racio, la homo de la spirito, la homo de la preĝo havu en si mem la superregadon".

Estas tempo de pentofaro, nome de la analizo de nia animo, de la malkovro de nia kunnaskita humileco. "Ni estas povraj homoj - diris Paŭlo 6a - ni estas malperfektaj estaĵoj, estaĵoj, kiuj, kunmezurataj kun la senfino, sentas veni al niaj lipoj, ĝuste ĉar ni havas la percepton pri la grandeco de Dio, la vortojn de la Dipatrino: "Humilitatem ancillae suae". Ni vere estas tiom pli malgrandaj, kiom vi, Dio, estas granda. Krome, en ni aldoniĝas alia fonto de humileco, kiu nin konfuzas, kiu nin maltrankviligas: ĝi estas la konscio, ke ni estas pekan

taj homoj. Ni ribelis kontraŭ Dio Patro, granda kaj bona, kaj mizerikorda kaj malama e disdonanta siajn gracojn kaj siajn bonfarojn, la unua el kiuj estas la fakto, ke li donis al ni la vivon, sian aspekton, kaj sian baptan alvokiĝon, vokante nin, por ke ni estu kunligitaj kun lia ekzisto. Kaj ni ribelis kiel knaboj malobeemaj, kiel stultuloj". La pentofaro estas analizo, portanta nin al veroj amaraj sed sanigaj, kaj ĝi kuntrenas senton de deprimiĝo, de humileco, de malaltiĝo, kiu konvenas al tiu, kiu eraris, kaj kiu devas reakiri la amikecon, la pardonon, la mizerikordon de Dio.

Poste la Papo turniĝis aparte al la junuloj, kiuj respondis al la kristana alvokiĝo. "Beataj vi - li diris - kiuj komprenis la kristanan vivon ne kiel iun ajn formalaĵon, ne kiel teorion, al kiu oni povas aliĝi aŭ ne aliĝi, ne kiel simplan spekulacion, kiu povas havi belajn pravigojn kulturajn artajn kaj spiritajn, sed kiu ne engaĝas la vivon, kiu ne ĉirkaŭpremas ĝin en siaj absolutaj postuloj. Beataj vi, kiuj komprenis, ke la aŭtentikeco de la kristana vivo postulas grandan kuraĝon. Ni povas esti kristanaj nur kun neŝancelebla kuraĝo, kun forto. Nia kristanismo ne devas esti mola, ĝi ne povas esti kristanismo laŭ la signifo trouzata en la komuna lingvo, kristanismo burĝa, klopodanta eviti la akraĵojn de la oferoj, kaj celanta vivon komfortan, honoratan, trankvilan, ĝuatan". La kristanismo konas ĉiujn dolĉecojn de la stilo de la boneco, de la karitato, sed en si mem ĝi estas stilo forta, severa, kiu volas esti travivata plene, kun potenco de heroeco respondanta jese, sen meto de kondiĉoj aŭ limoj al la voko de Dio, kaj vivanta en medio, kie pludaŭras dum la tuta vivo lia respondo de amo: "Jes, Sinjoro, mi volas vin servi senŝpare, sen iu ajn ŝajnigo, sen hi

pokriteco". Ni devas doni al nia kristana vivo la
saĝon, kiu ĝin kondukas al la vojoj de la Evangelio,
kiuj estas, ja, vojoj dolĉaj, amindaj, plenaj de huma-
na sento, de karitato, sed ankaŭ plenaj de forto kaj
de tiu leĝo enpenetranta la tutan kristanismon, kaj al
kiu ni estas direktiĝantaj tra ĉi tiu periodo de pre-
ĝado kaj de pentofaro: la leĝo de la Kruco.

La Parolo de la Evangelio venas konsoli ĉi-
ujn, kiuj tion komprenis, kaj ili povas ankaŭ korekti
iujn eblajn devojiĝojn, al kiuj nia vivo, eĉ kristana,
eĉ konsekrita, povus esti elmetita. El la Evangelio,
aŭskultita iom antaŭ la homilio, la Papo reliefigis tiu-
rilate du instruojn. La unua konsistas en postulo de
intenseco, entenata precipe en la versetoj antaŭantaj
la legitan fragmenton. Kun sincereco, kiu en tiuj tem-
poj kaj en tiu medio vere iritanta, verŝajne estis dan-
ĝera, oni diras al vi: se via justeco ne estas pli
granda ol tiu de la justecprofesiuloj (nome de la Fa-
riseoj), vi ne eniros en la Ĉielan Regnon.

Tiu justeco ne sufiĉas. Por la kristano, kiu
ajn justeco fronte de la postuloj de la Sinjoro ne es-
tas sufiĉa. Jen la Karesma krio: ne sufiĉas travivi
iel, laŭ certa mezuro, la kristanan vivon, kvazaŭ te-
mus nur pri pago de imposto por iu praktiko, por iu
formulo, por iu omaĝo. Aŭ oni travivas ĝin plene, kaj
tiam ĉio estas ĝojo ("Granda ĝojo" diras Sankta Ba-
zilo, ĝuste anoncante la Karesmon); aŭ ĝi estas io
vere mizera.

La dua indiko de la Evangelio, kiun la Ekle-
zio metas "in capite ieiunii" (en la komencon de la ka-
resmo) estas la jena: eĉ la vivo kristana, la vivo re-
ligia, povas havi en si mem kunnaskitan devojiĝon. Ĝi
povas esti perfidata de sia profesio mem, tio estas
de sia eksteraĵo, de la sinvidigo, de la sinkonigo. Ĝi

estas la vanteco pri la pietato, la vanteco pri propra boneco, pri estimindeco ĉe la aliaj, tiel perdante tion, kio por la Sinjoro estas plej grava. "Eniru en vin mem - konkludis la Papo -. Tie devas vivi via interparolo kun Dio, ne en la ekstera elmontrado kaj en la ekstera reklamado, nuntempe tiom laŭmoda. Ĉi tiu ne povas doni la rekompencon, kiun nur la Sinjoro mem atribuas. Vi jam ricevis vian rekompencon... Oni devas gardi la sekreton en sia konscienco, havi internan ĉelon por sia preĝo, por sia enpensiĝo, por havi ĉi tiun interparolon, vizaĝon kontraŭ vizaĝo, kun la Sinjoro, tiel ke nur la ĉiela Patro povu aŭskulti, kaj nur al li ni malfermu nian animon. Kaj la resto? La resto estu simpla... Sufiĉu la disciplino de nia regulo de kristana vivo, tia kia ĝin starigis la kutimo de la Eklezio. Koncerne la reston, la eksteraĵo estu serena, trankvila, bela, ĝi estu - diras la Sinjoro - parfuma, ĝi estu ridetanta. Tio, kio gravas, estas la interneco, la aŭtentikeco, la persona spiriteco, kiuj devas rekte konduki nian interparolon kun Dio, en la intimeco de nia meditado kaj de nia preĝado.

trad. C.M.-P.M.

## KIU ESTAS JESUO?

(En la ĝenerala aŭdienco de la 13a de februaro, daŭrigante la Kristnaskan temon, la Papo diris:)

"Kiu estas Jesuo? Ni neniun intencas humiligi per ĉi tia demando, ĉar ni supozas, ke vi ĉiuj scias doni pri li la difinon, kiun la katekismo proponas al ni: li estas la enkarniĝinta filo de Dio; kaj ke vi ĉiuj havas pri li riĉan konon el la evangeliaj rakontoj kaj teologiaj instruoj, verŝajne ankaŭ el piaj kaj artaj

bildoj. Prave; ni opinias, ke ĉi tio estas normalaĵo por ĉiu, kiu sin diras kristano.

Sed jen unua karakteriza kaj fundamenta noto pri nia kono de Jesuo: se ni konas vere lin, ni perceptas, ke ni ne konas lin sufiĉe. Tio, kion ni scias pri li , ne trankviligas nian neceson, nian devon de diligenta esplorado, sed stimulas, ekscitas, ardigas same neceson kaj devon; ni ĉiuj estas invitataj, preskaŭ logike kaj spirite devigataj koni lin pli bone, havi pri li pli klaran koncepton, pli konkretan, pli kompletan. La nova sciavido ne lasas nin pace, kaj puŝas antaŭen nian spiriton per sençesa ne satigebla demando: kiu estas Jesuo?

El ĉi tio, karaj fratoj kaj filoj, jen dua noto, rilatanta la konon pri nia Sinjoro Jesuo: Ĉi tiu kono estas laŭgrada. Ĝi ne estas nur sensebla bildo, prezentaĵo, evangelia sceno, biografia rakonto...; sed se ĉi tiu kono vere kelkmaniere impresis nian spiriton, ĝi vekis deziron pli bone identigi ĝin, kontroli ĝian signifon. Ĝi fariĝas problemo: fine, kiu estas ĉi tiu Jesuo?

Ĉiu el vi memoras, ke ĉi tiu priserĉado estiĝis eĉ ĉe la samtempanoj de Jesuo, ĉe kiuj, precipe post kelkaj liaj mirindaĵoj, ofte ripetiĝis la demando: "Kiu estas tiu, kiu ordonas eĉ al ventoj kaj al maro, kaj ili obeas al li?" Vi memoras, ke Jesuo mem instigis siajn disĉiplojn por ĉi tiu enketo. Rakontas la evangeliisto Mateo: "Jesuo, veninte al la regiono de Cezareo de Filipo, demandis de siaj disĉiploj: - Kiu estas, laŭ la homoj, la Filo de l' homo?" La opinioj estis malsamaj. Tio signifas, ke la revelacio, kiun Jesuo faris pri si mem, permesis, ja, travidigi ion eksterordinaran, sed ne sen iu homa vualo, ne ĉiam kaj ne al ĉiuj travidebla.

Eĉ Maria kaj Jozefo "miris pro tio, kion oni dira

dis pri la infano" Jesuo; kaj ne ĉiam entute ili komprenis pri tiu mistera infano. Liaj mem sampatrujanoj, el Nazareto, havas miron kaj suspekton je li, ne povante sufiĉe elkoni lian estadon. Oni dirus, ke Jesuo amas esti kaŝita.

La tuta evangelio de Johano estas plena de tiu incitanta problemo pri la esenco de la persono Jesuo: "Se vi estas Kristo, diru tion klare al ni"; kaj ĉirkaŭ tiu problemo disvolviĝas la dramo de lia pasiono, en la duobla proceso, religia kaj civila, kiu kondukas, la unua, al lia proklamo de Mesio, Filo de Dio; la dua, al lia deklaro, ke li estas la reĝo de la Judoj. Poste la mistera konkludo de lia reviviĝo, kiu superas eĉ la komprenon de ĝiaj senperaj atestantoj, ĝis tio, ke ili meritis la riproĉon de la reviviĝinto mem: "Ho malsaĝuloj kaj spirite malviglaj por kredi je tio, kio tamen estis antaŭanoncita de la profetoj!".

Jesuo estas mistero. Neniam ni sondos ĝin sufiĉe, neniam ni plene komprenos tion. La kono pri li devis fine disflui en la kredon, nome en superracian konon: certegan, sed bazitan sur atestoj, kiuj parte translimigas nian eksperimentan kontroleblecon. Sed ĉi tiuj atestoj havas en si mem konvinkopovon, ĉar ili estas diaj kaj postulas de ni tiun vastigantan manieron koni, per menso kaj koro, eĉ ne ĉion komprenante, - ĉar tromulto estas tio, kio montriĝas al ni, - kion ĝuste ni vokas kredo.

Jesuo devas esti pristudata per nia tuta komprenpovo (kaj komprenpovo el amo superas tiun de la pura inteligento). Tiel estis por la Eklezio: ĝi pripensis, pristudis, pridiskutis; pro tio ĝi ricevis ankaŭ la lumon de la Sankta Spirito; kaj per tre prudenta kaj fidela dumjarcenta laboro, ĝi sukcesis formuli la doktrinon ekzaktan, sed ĉiam transfluantan en la misteron de nia Sinjoro Jesuo Kristo: kiu li estis, kion li faris por ni, kiel li sin donas kaj donos al ni.

Ni vokas ĉi tiun centran ĉapitron de nia religio "kristologio"; kaj ni permesu, ke ankaŭ aliaj ĉapitroj, kiel la "ekleziologio"(tiom pristudita de la Koncilio) kaj tiu, rilatanta la Sanktan Spiriton, trapenetru nian doktrinon kaj nian spiritan vivon. Sed ni ne fermu la volumon de nia doktrino pri Kristo Sinjoro, kvazaŭ ni jam sufiĉe konus lin. Ni devas remalfermi ĉi tiun volumon; ni devas havi ĝin ĉiam sub la okuloj, antaŭ nia atenta medito, nia ama kontemplado. "Por mi vivi estas Kristo" diras sankta Paŭlo.

Kaj ni devas esti singardaj kaj ne malarmitaj kontraŭ opinioj, kiuj ŝajnas konvinkaj, sed fakte estas antaŭjuĝaj pri la metodo aŭ la enhavo, kiuj ekster la instruado de l'Eklezio pretendas doni novan interpretadon(hermeneŭtikon) fine nuligantan la aŭtentikan teologion pri Kristo.

Ni preskaŭ volus diskuti kun vi pri ĉi tiu moderna kaj subtila kontestado pri nia viva kaj vera Kristo, kaj ni volus sugesti al vi la legadon de kelkaj libroj. Sed ĉi tiu estas nek la oportuna loko nek la tempo; cetere ĉi tion vi mem povas facile priserĉi: serĉu tion ĉefe per la evangelia legado".

## ROMA ESPERANTA VOĈO
## n°126

LA ROMA ESPERANTISTA GRUPO per sia estrar-kunsido decidis unuanime honori la memoron de Kav. Luigi MINNAJA, proponante al la asembleo de la asociitoj, kiu estos kunvokata kiel eble plej frue, dediĉi al lia nomo nian Roman Asocion.

La 24an de ĉi tiu monato oni memorigos lin post la me-

so en S. Prassede, je la 10,30 h., ĉe la kutima kunvenejo, per parolado de Prof. Elio Migliorini, de D.ro Renato Corsetti, reprezentanto de F.E.I. kaj de D.ro Antonio De Salvo. Ni opinias, ke eluzi vortojn por inviti ĉiujn romajn samideanojn, povus ŝajni ofendo al la grandega estimo, kiun ĉiuj havis al li, kaj kiun oni povos iel esprimi per partopreno en ĉi tiu eksterordinara evento.

Lavango da leteroj kaj telegramoj venis al la funebranta familio kaj al nia Grupo, kaj ankoraŭ daŭre alvenas, ne nur de la tuta Italujo, sed de ĉiu mondparto, atestante lian eminentan figuron kaj la amon, kiun altiris lia modesteco. La Roma Grupo mencias kun aparta danko tiujn, kiuj bonvolis memorigi s-anon Luigi Minnaja per monoferoj por la Bonfara Kaso aŭ per celebrado de mesoj por lia animripozo.

\+ + + + + +

KARD. WILLEBRANDS, prezidanto de la Sekretariato por Unuigo de la Kristanoj, laŭ promeso farita al P.G. Korytkowski (v. K.S. paĝ. 33a), okaze de prezentado de lia verko "Ekumenismo kaj Internacilingva Problemo", sendis al nia s-ano, la kapucena patro-studento en Romo, gratulleteron, kiu rilatas ankaŭ ĉiujn kristanajn esperantistojn. Jen ĝia esperanta traduko:

Respektinda Patro,

Mi tre dankas pro via libro "Ekumenismo kaj Internacilingva Problemo".

Mi multe aprecas la klopodon de la kristanaj esperantistoj, meti la lingvon Esperanto je la servo de religia celo kaj aparte de la ekumena. Esperanto havas kiel propran idealon favori interkomprenon, unuecon kaj pacon inter homoj. Por la kristanoj mi volus esprimi esperon, ke la internacia lingvo kapablu doni efikan kontribuaĵon por la perfekta plenumo de la eklezia unuiĝo.

Dezirante prosperan sukceson por via laboro, kun la promeso de mia preĝo kaj kun mia beno,

via tre sindona

J. Kard. Willebrands

\+ + + + + +

ALIĜIS AL U.E.C.I. kaj al KATOLIKA SENTO (4a listo)

Aosto: A. Cuaz; Bolonjo: G. Albertazzi; G. Gimelli; A. Gamberini; Bolzano: F. Knoflak; Groseto: M. Casoli; Livorno: L. Neri Lami; Milano: P. Mamone; E. Bongiorni; Mondovio (CN): P. Beccaria; Napolo: C. E. Campano; Padovo: P. Tammone; Pistoia: U. Stoppoloni; Raveno: A. Duranti; Romo: F. Ruggiero; P. Tiĉ; O. Sias; C. Cecchitelli; G. Viti; G. Barbalace; R. Corsetti; R. Clerici; Santarcangelo (FO): A. Gambuti; Torino: S. Brusa; Tregnago (VR): A. Bonomi; Triesto: E. Grupo; Belgujo: E. Paesmans; Britujo: N. Vigar; Grekujo: K. Eliopulos; Hispanujo: M. Casanoves; P. Benedicto; Hungarujo: L. Kobor; Jugoslavio: A. Miakar; Nederlando: T. Durenkamp; J. Th. Fisher; Novzelando: J. B. Hamvai; Pollando: L. Kosjeniak; T. Veslav; J. Piwowarski; K. Martynski; B. Krzan; Usono: St. Klimowicz.

Entute: 280.

---

## El la Katolika Eklezio

---

LA ĜENERALA ASEMBLEO de la Episkopa Sinodo komenciĝos en Vatikano vendrede je la 27a de septembro. Tion ordonis Paŭlo 6a, kiu jam februare de la 1973a fiksis kiel temon de la proksima kunsido: "Evangelizadon de la nuntempa mondo". La temo estis elektita de la Papo laŭ propono de multaj episkopaj konferencoj, kaj aparte de tiuj faritaj per la episkopa konsilantaro de la

Ĝenerala Sinoda Sekretariato.
Prepara dokumento jam estis disdonita siatempe al ĉiuj episkopaj konferencoj, kiuj nun sendas siajn respondojn al la Sinoda Sekretariato.
Ĉi tiu estos la tria ĝenerala asembleo de la Sinodo kaj de la episkopoj post tiuj de la 1967a kaj 1971a (la Sinodo de la 1969a estis eksterordinara).

EKDE LA 1966a J. LA TEMO de la Semajno por Unuigo de Kristanoj, kiun oni celebras de la 18a ĝis la 25a de januaro, estas proponata de komisiono el delegitaj membroj apartenantaj parte al la Tutmonda Konsilio de la Eklezioj, parte al la Sekretariato por Unuigo de la Kristanoj. La temo elektita por ĉi tiu jaro estas: "Por ke ĉiuj agnosku, ke Jesuo Kristo estas la Sinjoro (Fil.2:1-3).

Tiu, kiu pensas al la ekumena problemo, povas opinii, ke ĉi tiu estas frukto de niaj lastaj jaroj, laŭ impulso de la Dua Vatikana Koncilio. Dum iuflanke tio veras, almenaŭ rilate la akcelon kaj la konsciigon de tiel fundamenta problemo, estas tamen samvere, ke la ama sopiro "Ut unum sint" ĉiam estis sentata en la eklezia historio kaj havas elstarajn pionirojn.
La Porunuiga oktago ne estas novaĵo; sed ĝi akiris reliefon nur lastatempe. Fakte tion iniciatis en 1898a Jakobo Wattson, dum li estis ankoraŭ protestanta pastoro. Tiutempe li fondis en Graymoor, ĉe Novjorko, du kongregaciojn, viran kaj virinan, nomitajn Atonement (elpago); sed post kelka tempo li eniris en la katolikan Eklezion kun siaj fondaĵoj, kiuj nomiĝis: Frat(in)oj Franciskanaj de l' Atonement. La Papoj benis kaj riĉigis per indulgencoj la praktikon de la preĝa oktago.
En la 1971a la Porunuiga Centro publikigis direktivaran libreton, kiu donas panoraman rigardon pri la ekumena agado, farita de katolikaj kaj nekatolikaj grupoj. El tio oni estas informitaj, ke en la tuta mondo ekzistas 62 e

kumenaj institutoj por studo de la unuiga celo, kaj pli ol 100 por ekumena aktiveco: 4 en Afriko; 12 en Azio; 1 en Aŭstralio; 1 en Novzelando; 60 en Eŭropo; 17 en la Norda, 4 en la Suda Ameriko.

PRI JUBILEO DE LA 1975a aperis en la bulteno de la Sankta Jaro soci-statistika enketo. La artikolo estas subskribita de mons. Jean Rodhain, prezidanto de la "Franca Katolika Asisto".
Kiu estos la probabla nombro de la pilgrimantoj? Ĉi tiu estas la unua demando antaŭmetita de mons. Rodhain. La respondo baziĝas sur du premisaroj: la unuaj pozitivaspektaj, la duaj negativaj.
La pozitivaj elementoj, tiuj nome, kiuj antaŭvidigas mo tindan alfluon da pilgrimantoj, estas tiel resumitaj: unualoke la kresko de la loĝantaro post la Sankta Jaro de la 1950a, kiu en Francujo, ekzemple, atingis dek milionojn da pliaj homoj. Do, rilate Francujon, eĉ se la procento de la pilgrimantoj kompare al la nombro de la loĝantoj havos neniun pliigon - laŭ mons. Rodhain - la sama proporcio kompare al la 1950a okazigos pliigon de 24 procentoj.
Alia favora elemento - laŭ mons. Rodhain - estas la pliigo de la popersona gajno en kelkaj katolikajlandoj, kiuj pasis de ĉirkaŭ 1.356 dolaroj en 1955a (v. indikojn de la organizado por kunlaboro kaj ekonomia progreso), al ĉ. 2.866 dolaroj en 1971a. Laŭ li estas do plifaciligita vojaĝebleco, do pilgrimadoj eĉ por la plej malriĉaj personoj.
Sekvas kalkulo analogie komparata pri la turisma movado al Romo el ĉ. 2 milionoj de la 1950a al ĉ. 4 milionoj de la 1972a. Krome en la Sankta Jaro 1950a estiĝis nombro da pilgrimantoj kvinobla kompare al la Jubileo de la 1925a.
Alia favora indico estas donita de pli granda facilig de veturiloj, hodiaŭ pli nombraj, malkaraj kaj rapidaj.

Laŭ mons. Rodhain la proksima pilgrimado al Romo estos favorata de du kromaj kaŭzoj: vasta sento inter fideluloj pri neceso de stabila bazo en la eklezia vivo kaj aspiro al apostolaj tradicioj, kiuj stimulas rigardi al Romo; dum interhoma repacigo, temo de la Jubileo, favoras ĉiun esperon. Inter la pozitivaj elementoj, la verkinto mencias ankaŭ, en amasmovadoj, ekziston de ne kontroleblaj ondadoj, kiujn oni ne povas antaŭvidi, sed kiuj ne estas pro tio malpli realaj.

Mons. Rodhain mencias ankaŭ kelkajn eblajn motivojn, kiuj povas bremsi la pilgrimantan alfluon: sintenon de kelkaj malkonsentaj grupoj kaj aparte monkrizon. Pri ĉi tiu lasta punkto li antaŭvidigas, ke se gastigantoj troigos la kostojn, la pilgrimantoj eble reduktos sian restadon aŭ aliigos siajn programojn.

"ENCHIRIDION MARIANUM" aŭ kolekto de la plej trafaj tekstoj el biblio kaj patrologio, rilatantaj la Dipatrinon, aperis zorge de mons. Domenico Casagrande .

La mirinda verko el 2016 paĝoj en unika volumo, estas granda progreso komparekun aliaj similaj laboroj ĝis nun aperintaj: G.M.Besutti - Bibliografia Mariologica, (1946-1966); J.T. Bourassé (el la Patroj grekaj kaj latinaj); Migne, ktp. Ankaŭ Casagrande elektis tekstojn el la du patrologioj, sed pli vaste, kaj unue la doktrinajn tekstojn. Kiam li transprenas ilin el la aliaj Patroj, per mallongaj notoj li korektas, reĝustigas, indikas dubajn aŭ apokrifajn tekstojn. Sed li aldonas multajn aliajn gravajn tekstojn, uzante kronologian ordon. Ĉiam, laŭ ebleco, li datigas la tekstojn, kaj ankaŭ ĉi tio donas valoron al lia verko, kiu finiĝas per 80 paĝoj da pluraj indeksoj, inter kiuj dek paĝoj pri la titoloj de la Virgulino, kaj laste pri herezoj kaj herezuloj.

Laŭ la impulso de Paŭlo 6a, kiu orientigis la mariologian internacian postkoncilian kongreson al la Biblio

kaj al la Patroj, estiĝis preskaŭ konkuro de projektoj, sed plejofte tro ampleksaj. Mons. Casagrande donis do valoran kontribuaĵon per ĉi tiu "Enchiridion", al ĉiuj, kiuj, pri tiu abismo de sankteco kaj graco, kia estas Maria, klopodas priserĉi aŭtentikajn tekstojn de la revelacio kaj de la Patroj.

LA ITALA FEDERACIO DE LA KRISTANAJ organizoj por la volontula internacia servo kalkulis, ke en la ĵus pasinta jaro estiĝis notinda pliiĝo de volontuloj: 146, nome 25 procentoj, kompare kun la 1972a. Temis pri 64 virinoj kaj 82 viroj. El ĉi tiuj 46 petis prokraston de militservo (en la 1972a ili estis 18).

LA VALDANOJ CELEBRAS dum ĉi tiuj tagoj la okan jarcentan datrevenon de sia movado.
Fakte, en 1174 iu franca komercisto, kutime indikata kiel Pierre de Valèz (Pietro Valdo itallingve), sekve de "inspiro" dum evangelia medito, disdonis ĉiujn siajn havaĵojn al malriĉuloj, kaj kun kelkaj legaĵoj de la Nova kaj de la Malnova Testamento, komencis trairi, predikante, urbojn kaj vilaĝojn. Lia vivo estis - oni povus diri - preskaŭ franciskana: humilo, absoluta malriĉeco, obeo al la evangelio, predikado de la dia vorto al la popolo. Baldaŭ multaj, viroj kaj virinoj, logataj kaj trenataj de liaj vortoj kaj liaj ekzemploj, sekvis lin.
En la 1179a Valdo sin prezentis en Romo al Papo Aleksandro 3a por proponi siajn ideojn siajn ideojn kaj sian vivregulon. La Papo aprobis la malriĉecan voton de Valdo, sed ne lian predikan agadon. Tio estis la unua "rompo" kun la Eklezio, ĉar Pietro Valdo, konvinkita pri sia decido, daŭrigis sian iradon tra Eŭropo, predikante kaj kolektante ĉirkaŭ si novajn kunulojn, kvankam neniu tiam pensis fondi disigitan "Eklezion". Sed en la 1184a la "malriĉuloj de Liono" - tiel estis

iam konataj la Valdanoj - estis prijuĝitaj kaj kon - damnitaj pro herezo en la Koncilio de Verono. De tiu tempo komenciĝis pri ili longa kaj dolora per - sekuthistorio, sekve de kiu, ili rifuĝis en Piemonto, ĉefe en la valoj Kisono kaj Pelliĉe. Nur en la 1848a reĝo Karlo Alberto agnoskis al ili la civilajn rajtojn kaj donis kultliberecon. Post la reformo ankaŭ la valdanoj aliĝis al ĝi, starigante la "Valdanan eklezion", kies doktrinoj estas multe influataj de la Kalvinaj (justiĝo pere della nura kredo,antaŭdestino , superregado de la dia vorto).
La kulto konsistas esence en predikado, legado,medito de la Biblio, en celebro de la Sankta Vespermanĝo (kiu estas nur memorigo de la krista pasiono). La ekleziaj kolektivoj estas gvidataj de konsilantaro kaj de pastoro, kies ofico havas sakramentan karakteron. En Romo la Valdanoj posedas viglan teologian fakultaton kaj eldonan firmon: " La Claudiana".
Ili celas konkretan ekumenismon, sed ne supraĵan kompromison, kvazaŭ ignorante la esencajn ekzis - tantajn diferencojn. Ekumenismo, kiu agnosku tion, kion ili konsideras, eĉ ĉe la Ekumena Konsilantaro de la Eklezioj en Genevo, en kiu ili partopre - nas: "vokiĝo" al necedema fideleco pri evangelio". La valdana pastoro Ribet, dum la datrevena celebro, konsentante, ke restos multaj malakordaj punktoj, asertis, ke "ekumenismo nenio alia estas ol kuniĝo de eklezioj en Kristo, ĉar nur li estas la unueco."

EN LA SVISA KATOLIKA SINODO okazinta en Berno dum la ĵus pasintaj tagoj, tri temoj estis ĉefe debatitaj: bapto de infanoj, teologia esplorado kaj sinteno de katolikoj antaŭ militservo .
Je la fino de la laboroj la 180 delegitoj trovis a-

kordon pri la du unuaj temoj, dum ili komisiis al la diocezaj sinodoj la trian.
La raporto pri bapto de infanoj insistas, ke ĝi devas esti donata kiel plej eble frue, lasante tamen al la sacerdoto la tempon necesan, por ke li klarigu al la gepatroj la signifon de la sakramento. Tamen, se la gepatroj volas, la bapto povas esti prokrastata ĝis la racia aĝo, kaj tiukaze la sacerdoto proponos "akceptan riton" kiel katekumenan etapon.
Ĉirkaŭ la teologia esplorado la Sinodo petas de la fideluloj, ke ili sin detenu de prijuĝoj kaj pasiaj sintenoj, kaj rekomendas al la Sankta Seĝo, ke ĝi intensigu dialogon kun teologoj.
Pri la sinteno de kristanoj antaŭ militservo estiĝis du pozicioj: de tiuj, kiuj realisme akceptas la aktualan situacion, kaj de tiuj, kiuj laŭ profeta sento proponas ne-perforton.

PRI VIRINAJ VOKIĜOJ en Francujo estis efektivigita enketo pere de religiaj aŭtoritatoj. El ĝi oni povas konstati, ke de la 1969a ĝis 1973a j. la tuta nombro da fratinoj malpliiĝis de 110.000 al 101.000, kaj ke la forlasoj de la religia vivo (ne konsiderante do la morton) superas la novajn vokiĝojn.
Ĉi tiuj ne plu venas, kiel antaŭe, de la kampara medio, sed prefere de la urba (profesorinoj, instruistinoj, oficistinoj, sociaj asistantinoj). Dum kvar jaroj estis fermitaj 1500 institutoj aŭ religiaj domoj, sed malfermiĝis 1000 novaj (t.e. 10 procentoj de ĉiuj ekzistantaj en Francujo). Ĉefa karaktero de ĉi tiuj formoj de komuneca vivo estas la intima kunligo kun la medio, en kiu la religiulinoj laboras, kaj la konsisto de ĉi tiuj novaj kolektivoj: nur 4 aŭ 5 personoj, dum antaŭe ili estis multe pli. La enketo montras ankaŭ ke, kompare al la pasinteco, kreskis meza aĝo.

ESTIS ĴUS PUBLIKIGITA en Amsterdamo - Nederlando - la unua volumo de "Compendia Rerum Judaicarum ad Novum Testamentum", ampleksa analizo de la rilatoj inter Hebreoj kaj Kristanoj dum la unuaj jarcentoj de la kristana erao. Pri la kolekto (10 volumoj) zorgis internacia grupo de eminentaj katolikaj, protestantaj kaj hebreaj spertuloj, sub inspiro de la Vatikana Sekretariato por Unuigo de Kristanoj, de la Tutmonda Eklezia Konsilio, de la Reformita Nederlanda Eklezio kaj de la Usona Hebrea Komitato.

Profesoro Marino de Jonge, el la stabo de la eldonantoj kaj dekano de la teologia fakultato en la universitato de Lejdeno en Nederlando, priskribante la verkon, substrekis ĝiajn ĉefajn celojn, priserĉi, nome, kie la bazaj konceptoj de Judismo kaj Kristanismo renkontiĝas aŭ diferenciĝas, kaj per tiu esplorado, akceli novajn kaj bonajn rilatojn inter hebreoj kaj kristanoj de nia epoko.

La projekto de la entrepreno naskiĝis en 1964a, kiam komisiono da hebreaj kaj kristanaj teologoj agnoskis neceson de renkontiĝo de la du teologiaj tradicioj. Ĉi tiu estas la unua fojo, ke kleruloj de la Nova Testamento kaj de rabenaj tekstoj kunlaboras ĝi el kunigite por komuna celefektivigo.

APERIS EN VIBORG - Danlando - "Vejen"nome la dana traduko de "Camino" (en la hispana originala lingvo), verkita de mons. Escrivà de Balaguer, fondinto de la Internacia Katolika Asocio "Opus Dei". Kun la nederlanda kaj la finnlanda eldonoj, antaŭ ne longe aperintaj, la tuta eldonkvanto de la libro atingas ĉirkaŭ du milionojn kaj duonon da ekzempleroj. "Camino" estis tradukita krom en la esperantan lingvon (kun titolo: Vojo), ankaŭ en ĉiu okcident-eŭropajn, en plurajn slavajn, (rusan, polan, ĉeĥan), en

la ĉinan, japanan, tagalogan, araban, hebrean, hungaran, rumanan kaj grekan. Entute temas pri 111 eldonoj en 29 lingvoj. Aperis ankaŭ eldonoj en Brajlo por blinduloj.

12 VOLUMOJ KOLEKTAS la tre interesajn Aktojn de tri semajnoj dediĉitaj en Bonno al sciencaj studoj pri misioj.
Antaŭ dek jaroj en tiu urbo, verbita misiista grupo, decidis starigi en instituto Sankta Aŭgusteno, centron por sondado de problemoj rilatantaj misiojn. Fakte, tiu instituto, inter multaj aliaj iniciatoj, okupiĝas ankaŭ pri formado kaj pretigo de misiistoj, kapablaj renkontiĝi kun aliaj spiritaj kulturoj kaj malsamaj religioj. Riĉa pri ampleksa biblioteko, la instituto donas eblecon de sciencaj esploradoj pri la historio de misioj, etnologio, kultura kaj religia antropologio.
La unua studsemajno okazis en Sankta Aŭgusteno en la 1971a pri la temo: "Ĉu misioj hodiaŭ?" La postan jaron la Semajno disvolviĝis en Sankta Gabrielo apud Vieno, pri temo: "La eklezio inter popoloj.- Junaj komunumoj priserĉas sian identecon". En 1973a la Semajno havis lokon en Munkeno de Bavarujo kun la jena problemaro: "Misioj: ĉeesto, evangelizado, konvertoj".

DE LA 1956a ĜIS NUN la katolikoj de la diocezoDa Nang, en Sud-Vjetnamo, duobliĝis, pasante de kvindek al cent-mil. Ĉi tiu estas unu el la plej okulfrapaj indikoj de la vigleco de la katolika kumunumo Da Nang, fariĝinta diocezo je la 18a de januaro de la ĵus pasinta jaro.
La eklezia departemento vastiĝas laŭ pli ol 11.000kv. kilometroj, kun loĝantaro de unu miliono kaj duono da personoj. Zorgas pri evangelizado 104 sacerdo-

toj, el kiuj 99 vjetnamaj. Kunlaboras en la apostola agado pluraj religiuloj kaj multaj fratinoj. Dum ĉi tiu jaro baptiĝos inter 800 kaj 900 katekumenoj. Unu el la plej grandaj esperoj de la diocezo fondiĝas sur la aspirantoj al sacerdoteco, 61 en la grandaj seminarioj de Hué kaj Dalat kaj 252 en la malgranda (de Da Nang) gvidata de Vjetnamaj Sulpicianoj. Estas preskaŭ finkonstruita nova granda interdioceza seminario por studentoj pri filozofio, venantaj de la ses ekleziaj zonoj de la centra sudvjetnama parto.
La nuna floranta situacio de la diocezo de Da Nang estas frukto de evangelizado, entreprenata antaŭ kvar jarcentoj de dominikanaj, franciskanaj, aŭgustenanaj kaj jezuitaj religiuloj.

SEP ĈINAJ KARMELANINOJ venintaj de Hongkongo, ĵus alvenis al la Havajaj insuloj por fondi tie la unuan domon de sia ordeno. La grupo konsistis el ses votintaj fratinoj (el kiuj unu eks-priorino de la Hongkonga monakinejo) kaj unu novicino.
La decido malfermi monakinejon en Havajaj insuloj estis farita okaze de vizito al Hongkongo de mons. Scanlan, episkopo de Honoluluo. Li certigis la filinojn de Sankta Tereza, ke 17 aspirantinoj jam atendas ilin en lia diocezo, kaj ke li metas domon je ilia dispono. Cetere la Hongkonga "Karmelo" devis disiĝi, ĉar la fratinoj jam atingis la plej altan nombron permesitan de iliaj reguloj, kaj ili devis protio eĉ malakcepti novajn postulantinojn.

REKORDAN CIFERON ATINGIS la fondusoj, kiujn la katolika organizo "Caritas" en Hongkongo kolektis ĉijare: preskaŭ 150 milionojn da liroj. Ĉiuj parokoj kaj katolikaj institutoj kunlaboris en la du grandiozaj manifestacioj, kiuj pretigitaj estis en in

sulo Viktoria kaj en Kowloon por asistaj celoj. La iniciatoj (loterioj, recitoj, vendo de donitaĵoj,ktp.) estas jam tradicio en la socia vivo de Hongkongo. Antaŭ dudek jaroj ĉi tiu organizo komenciĝis sen iu ajn propra financa rimedo. Kaj tiam estis malfacile sin adresi al la loka katolika loĝantaro, konsistanta preskaŭ tute el rifuĝintoj. Tiam helpoj venis de karitataj asocioj el Germanujo, Belgujo, Svisujo kaj el la Usonaj Porkatolikaj Helpoj. Sed la Hongkonga "Caritas" klopodis envicigi pli kaj pli la lokan loĝantaron, por ke ĝi surprenu respondecon de helpo al siaj samlandanoj.
Pere de la kolektitaj fondusoj kaj registaraj helpoj, ĝi sukcesis asisti 1.727.395 personojn per la plej malsamaj servoj de socia agado, instruaj kaj kuracaj. La moderna hospitalo de ĝi konstruita havas kapablecon de 900 litoj. Se ni memoras, ke la Hongkonga loĝantaro atingas iom pli ol kvar milionojn da personoj, oni devas agnoski la rimarkindan sukceson de ĝia agado.

PROJEKTO POR LA KREO DE FEDERACIO pri ĉiuj kristanaj teologiaj institutoj en Hindujo estis aprobita en ĵusa kunveno de 30 reprezentantoj de seminarioj, kolegioj kaj fakultatoj protestantaj, katolikaj kaj ortodoksaj de la lando. En dokumento, redaktita ĉe la fino de la renkontiĝo, la delegitoj agnoskas necesson de asocio, kiu entenu ĉiujn teologiajn centrojn, kiel unuan paŝon al fondo de Teologia nacia universitato. Tiucele estis starigita komisiono, kiu krom formuli planojn kaj programojn pri la nova asocio, celos ankaŭ submeti ilin al la aprobo de la plej altaj ekleziaj aŭtoritatoj.

INTENSAN POREVANGELIAN fortostreĉon oni havas en la ĉefdiocezo de Papeete kaj en la diocezo de Ta

iohaé en la franclingva Polinezio. En Papeete el loĝantaro de 115.000 personoj, 34.000 estas la katolikoj, spirite asistataj de 36 sacerdotoj, 34 kunlaborantaj fratoj kaj 43 fratinoj. En Taiohaé, kie preskaŭ ĉiuj ĝiaj 5.600 loĝantoj estas katolikoj, ili estas helpataj de 7 sacerdotoj, 3 kunlaborantaj fratoj kaj 8 fratinoj.

La klerikaro de ĉi tiuj du ekleziaj regionoj konsistas el misiistoj, escepte de nur unu indigena sacerdoto ordinita antaŭ 10 jaroj. La pli junaj seminarianoj estas entute 33. Tro malmultaj por la bezonoj de la loka eklezio. Pro tio oni klopodas prepari kapablajn katekistojn kaj adapti liturgion kaj katekizadon al la lingvo kaj pensmaniero de la loĝantaro.

Oni jam faris en Papeete, diocezan Sinodon en la 1970a, kun partopreno de multaj agemaj kristanoj; kaj alian en la ĵus pasinta jaro, dediĉitan ĉefe al la parokaj komunumoj kaj al la movadoj pri la familia apostola agado.

La paŝtista nuntempa orientiĝo iras laŭ du direktoj: instruado donita de la eklezio pere de dekunu malsuperaj lernejoj kun sep-mil lernantoj, kaj 9 superaj, kun 2.500 studentoj. La alia direkto rilatas la pliigon de la socia komunikado, tre grava en regiono, kie la loĝantoj estas disigitaj tra multaj insuloj, el kiuj kelkaj malofte atingeblaj de sacerdoto.

SEKVE DE INTERVENOJ DE la katolika episkopa konferenco kaj de aliaj ekleziaj instancoj en Aŭstralio, la leĝprojekto pri la homaj rajtoj estos amendata. La justic-ministro, Senatano Murphy, precizigis, ke la amendoj celos forigi timojn flanke de la eklezio pri kelkaj punktoj de la leĝpropono.

Tiuj timoj ne estas sen gravaj motivoj; ĉar en la listo de la homaj rajtoj ne estis agnoskita, kiel fundamenta societĉelo, la familio, kaj ne troviĝas la raj

to de la gepatroj elekti por siaj filoj la moralan kaj religian eduktipon laŭ siaj konvinkoj; krome, ekzistas klaŭzo, per kiu la registaro havus rajton reguligi tempon, lokojn kaj manierojn, laŭ kiuj oni povas manifesti kaj praktiki religiajn sentojn.
Precipe pri ĉi tiu punkto la reprezentantoj de eklezioj organizoj esprimis timon, ke la klaŭzo konsentus al la registaro reguligi la tutan sektoron de la religia praktiko. Akceptinte la delegitojn de la katolika, anglikana kaj presbiteriana eklezioj, la ministro de Justico certigis, ke la leĝprojekto estos diligente reviziita kaj korektita laŭ la sugestoj, por ke ĝi fariĝu pli klara kaj forigu miskomprenojn.

"ROCK-MUZIKA DISKO, titolita "The Lord's prayer" (La preĝo de la Sinjoro) estis vendata dum ĉi tiuj lastaj tagoj laŭ pli ol duonmiliono da ekzempleroj en Usono. Ĝi estas kantata de aŭstralia religiulino 36jara, fratino Janet Mead, kiu lernis pianon kaj violonon en konservatorio kaj sindediĉis al Dio 17jara. Ankaŭ la komponisto estas aŭstralia, Arnold Strals.
Fratino Janet surdiskigis la kanzonon pasintjare okaze de "Festival Records" kaj ĉi tiu estas ŝia unua eksperimento en ĉi tiu kampo.
En Aŭstralio oni vendis 70.000 ekzemplerojn de tiu disko. Intervjuite dum ĉi tiuj tagoj, la religiulino diris: "Per mia laboro mi celas rekonduki la homojn al Dio per muziko. Mi dankas la Sinjoron pro la feliĉo kaj la profunda komprenemo, kiujn mi spertis en mia vivo, kaj kiujn mi deziras komuniki al la aliaj".

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

ABONKOTIZON
AL KATOLIKA SENTO
SACERDOTOJ POVAS PAGI
ANKAŬ PER CELEBRO
DE DU S. MESOJ,
PRI KIUJ ILI BV. INFORMI
P. JACOBITTI

| | |
|---|---|
| *Quota di abbonamento L.* | **1500** |
| *Abonkotizo* | *italliroj* **1500** |

SPEDIZIONE
IN ABBONAMENTO POSTALE
GRUPPO IV/70
BOLLETTINO MENSILE